

NIA VOĈO  
Madrida Esperanto-Liceo  
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

APRILIO 2001

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:

<http://www.ciudadfutura.com/esperanto>

**VALENCIO: “FALLA” EN ESPERANTO**

Tiu ĉi jaro la infana “falla” de la strato D-ro Zamenhof-Norte havos la tekstojn en esperanto. Ankaŭ la “falla” libreto fallero havos artikolon en Esperanto. La tuta “falla” estas omaĝo al la lingvo Esperanto kaj al D-ro Zamenhof. Ĉiu teksto de la “falla” aperas kaj en valencia kaj en esperanta lingvoj.

**PRI E-SIMBOLO. ĈU STELO, ĈU MELONO, ĈU ALIA?**

Ĉu la stelo estas moderna simbolo? Ekde la pasinta kongreso en Madrido tiu demando havas polemikajn respondojn kiuj malfermis debaton en “Boletín”. Por Northop, entrepreno kiu konstruas aviadilojn la stelo estas taŭga simbolo. En la koverto de la numero “Aviation Week & Space Technology” February 19, 2001 aperas dufoje la simbolo kun stelo, preskaŭ la sama desegno ol la esperanta. Ankaŭ por Lupe estas taŭga simbolo por esperanto.


**ESPERANTO EN EŬROPO**

Okaze de la Eŭropa Jaro pri Lingvoj, en Hungario oni verkis kajeron “Brilu ĉiu lingvo samrajte! Por multlingveco kaj egalrajta komunikado en Eŭropo”. La hispana versio estas preparita de Alonso Nuñez.

**SUR LA SPUROJ DE FEDERICO GARCÍA LORCA**

Se vi ankoraŭ ne havas tiun mirindan verkon, originale verkita en esperanto pere de Miguel Fernández, aĉetu ekzempleron al Libroservo aŭ persone ĉe HEF. (1.200 pesetojn).

("Esperanto" UEA. Januaro 2001)



## NOVA TTT-PAĜO DE HEF: [www.esperanto-es.net](http://www.esperanto-es.net)

### EXPOLINGUA - 2001

9<sup>a</sup> ĝis la 22<sup>a</sup> de aprilo, en la pavilono 11 ("la pipa") ĉe la foirejo de "Casa de Campo". HEF disponos pli grandan standon (n-ro: 89) ol pasintjare kaj kalkulos je la malavara financ-helpo de la entrepreno INALTEL, kiu donacos por la okazo 150.000 ESP. Inter la aktivaĵoj ĉi-jare prezentotaj menciindas la ĉeesto de Miguel Fernández (sabaton, la 21<sup>a</sup>, de la 18.00 ĝis la 20.00), verkisto kaj tradukinto de Lorca en esperanton, kiu volonte subskribos siajn verkojn en la stando; kaj la antaŭpublika prezentado de esperanto far Miguel Gutiérrez Adúriz (dimanĉon, la 22<sup>a</sup>, je la 13.00), en salono preparota de la organizantoj por la okazo. Kompreneble, en la Eŭropa Jaro de la Lingvoj, esperanto ne povas malĉeesti la foiron.

### ASTRONOMIA LIBRO

Unuafoje en Esperantujo, aperas plena monografio pri moderna astronomio. "La kosmo kaj ni: galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo (elementa kurso pri astronomio)". Kune eldonita de Flandra Esperanto-Ligo kaj Fundación Esperanto. La unua parto temas pri ĝenerala astronomio kaj la dua pri la plej aktualaj temoj de moderna astrofiziko. La aŭtoroj estas D-ro David Galadí-Enríquez (esploristo en la Centro de Astrobiologio apud Madrido, Hispanio) kaj D-ro Amri Wandel (profesoro en la Universitato de Jerusalemo). Jen bela ekzemplo pri aplikado de Esperanto en sciencoj, kaj pri aktiva internacia kunlaborado pere de nia lingvo.

### ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILO

Sub la titolo "La renaskiĝo de esperanto, alternativa lingvo" la franca ĵurnalo "Le Monde" de la 9-a de januaro (suplemento ekonomia) publikigis relative bonan kaj pozitivan artikolon pri esperanto.

### FAMA ESPERANTISTO

En la jaro 1905 la revuo "Aplech" publikigis artikolon pri la internacia lingvo kaj pri la pioniroj de esperanto en Figueres (Girona). Unu el ili estis la notario **Salvador Dalí**, patro de la fama pentristo de la sama nomo, kiu partoprenis en la 5-a U.K. de Esperanto en Barcelono en la jaro 1905, lia kongresnumero estis 162.

### VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj:

16-an de aprilo "Popularaj tauroludoj". Lumbildoj. Lupe Sanz

21-an de majo "Internacia jaro pri lingvoj. Esperanto en Expolingua". M. Parra

18-an de junio "Sicilia, filma insulo". Lumbildoj

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4ºB. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal